# La Pacdefendanto

N-o.6. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČSR. Junio 1952

## LA LASTA INTERVENO DENOVE prokrastis definitivan decidon

Kion faras la "intervena komisio", kio okazos kun nia esperantista centro?- Jen demandoj,kiuj konstante pušas sur la pordo de nia redakcio. Estas malfacile,doni klaran respondon.La esperantistoj mem devas difini la situacion en kiu nia movado trovigas.Dum la lasta tutlanda laborkonferenco en Praha,la presidanto de EAČSR,k-do.Ad.Malík ja tute klare reprodukis la oficialan opinion de superaj instancoj,kiu tiam multe malkontentigis la čeestintojn. Estis elektita komisio por interveni pri tiu afero če la kompetentaj instancoj.Certe tiu či komisio,kiu guas la fidon de la čsl.esp-istaro ne guas tiun honoron kun enpošigitaj manoj en sekretariejo.Estis jam entreprenitaj kelkaj intervenoj če la plejaltaj instancoj kaj čiuj kun bona sukceso,dank al la abunda dokumenta materialo,per kiu niaj k-doj.povis argumenti.Sed bedaŭrinde, sen atingita rezulto.La lasta interveno okazis la 22.5.en la ministeriejo por interno,kie ni jam renkontigis kun fiksa preskaŭ decido kaj nur dank al la entusiasma defendo kaj politika argumentado de nia komisio,la malagrabla decido denove prokrastigis je nia favoro. Ankoraŭ restas la pordoj por ni mal fermitaj.Iu al ni ne konata potenco kreis tute malfavoran situacion kon-cerne nia movado kaj necesas streči la tutan forton kaj kapablecon, por atingi almenaŭ minimalan sukceson.Oni rigardas nian movadon superfluan,movadon de unuopuloj, kiu havas nenion komunan kun aliaj amas-organizoj.Kaj fakte,nur tre malfacile ni sukcesas konvinkigi la respondecajn faktorojn pri la malo.Nia movado gis nun plejparte vivis kiel sekto,apartigita de la laborulamasoj.Ni ne kapablis enpenetri la potencajn amasorganizojn,kiuj en tiu situacio solaj povus esti nia apogilo.Čiu movado,kiu venas de el malsupre,el la popolamasoj havas šanco defendi sian ekzistorajton kaj disvolvigi sian ideon.Bedaŭrinde,la esperantistoj en tiu kazo restis flanke.Anstataŭ enpenetri la diversajn, laboristajn organizojn,societojn ka grupojn por farigi peranto en inter naciaj rilatoj,akiri la atenton de la neesperantistaj membroj pri la -ta valoro de internacia interkom prenilo,niaj esp-istoj tute kontentigis per arangado de konversaciaj rondetoj,individuaj rilatoj kun samopiniaj esp-istoj eksterlandaj,interšango de il.p.k.kaj p.m.ktp. Ili restis isolitaj,nur inter si mem,se kontakto kun la ekstera vivo.Kaj t ni estas ankoraŭ nun,bedaŭrinde je nia propra domago.

Tute aliel status la situacio,se r esperantistoj estus enkreskintaj e čiuj nacilingvaj organizoj,partiaj kaj sindikataj grupoj,gazetredakcio, kaj čie,kie koncentrigas laboruloj, kaj guus ilian aprobon,simpation k subtenon.En tia kazo tute ne eblus trakti nin superfluaj,balasto aŭ ne fidindaj.

Ni „malfruigis la vagonaron",sed ta men,ankoraŭ ne estas malfrue,nur ni eble devos komenci de la komenco pc atingi tion,kion ni antaŭe malfruig is kaj kredis ne bezona.La tutmonda internacia situacio farigas de tag al tago pli atentinda.Eble baldaŭ t situacio baros nian vojon ankoraŭ pliforte.La mondpaco estas en konstanta dangero.Povas veni tempo,kiam pli gravaj interesoj kaj pli aktualaj,flankenpremos la aferon de inter nacia lingvo,sed se ni restos fort k.persistaj,ni tiun tempon traviv

## TRAGEDIO DE INFANOJ EN HISPANIO

Povas esti,ke oni ne atentas la suferadon de la infanaro en Hispanio aparte de la generala mizero kaj malbonstato,kiu regas en tiu lando. Sed artikolo,kiu aperis en meksika gazeto„Espana y la paz",devas ŝoki la internacian konsciencon por ankoraŭ pli energia protekto de la infanaro.

En eŭropaj landoj hodiaŭ la terura malsano - Lepro -estas tre malofta.Ne tiel estas en Hispanio.Same pri kancero ĉe infanoj,sed en Hispanio gi abundas.Jen mallongaj citaĵoj el tiu gazeto:

„Kadukigintaj,tuberkuloz-havaj,mal-junigintaj antaŭtempe,okuloj plenaj da malsato kaj timo."

„La ciferoj pri la lepro estas timigaj.18.000 infanoj trovigas inter la homoj de tiu ĉi malgano afliktitaj...18.000 sub la ago de 14 jaroj.Por kompari,jen enketo pri Francio: En tiu lando trovigas nur 30 lepruloj - inklusive homoj el Afriko kaj Sudameriko - en kliniko de Gard.Ankaŭ unu aŭ du estas en la al-poj,en la Pasteur-instituto kaj en Zarsepilles."

Pri blindeco statistikoj el Hispanio malkaŝas,ke pli ol 30 el cento de infanoj suferas okulmalsanon pro manko da vitaminoj,malpureco,manko de higieno kaj tro densa kunlogado, kaŭzata pro manko da taŭgaj logejoj Granda nombro logadas en kavoj kaj domaĉoj,konstruitaj el io ajn ĉe mane trovita materialo.

Statistikoj el lernejoj montras,ke 75 el cento suferas ia grade pro tuberkulozo.75.000 infanoj estas men-se subnormaj.Infanoj de mizere pagitaj laboristoj neniam vidis pupon aŭ alian ludilon.-

La landa gazetaro ofte esprimas sin malŝategе pri la grandega nombro da infan-almozpetuloj kaj admonas,ke tio malbone impresas la eksterlandajn gastojn.Statistiko montras,ke la policistoj arestis kaj enkarceris jam milojn da infanoj.La nombro,kiu pasis tra specialaj infan-jugejoj estas 184.034.

En la komparo,por sarki kaj rikolti laboras pli ol 700.000 infanoj de la sesa jarago.Lego malpermesas,ke infanoj malpli ol 14 jaragaj laboru en industrio.Sed multaj fabrikejoj ignoras tiun legon.En la fiŝindustrio laboras pli ol 6.000 kaj en la teksindustrio ĉiu sesa laboristo estas infano.Se la infano suferas akcidenton,oni ne pagas kompenson ĉar „la infano laboras kontraŭ - lege".

El„Spain To-Day",May 1952 tradukis k-do. C.Fielding-Cardiff

## OSTRAVA SUB LA VERDA SIGNO

La granda ĉeĥosl.industria urbo Ostrava,la urbo de entusiasma konstruado de nova socialista epoko, travivis la 11.de majo altsignifan okazintaĵon.Estis inaŭgurita Esperanto-monumento okaze de 360 jara datreveno de J.A.Komenský,okazis Esperanto-ekspozicio kaj regiona kunveno de esperantistoj.

Je la 3/4 10 matene ekmarŝis procesio de la gastejo Eliáš akompanata de muzikkapelo tra la stratoj Chalupníkova,Březinova kaj Zengrova al la parko de Milan Rotter.En la frunto marŝis 8jara knabo kun 7 jara knabino portanta grandan bugedon da siringoj.En la dua vico marŝis la fondinto de la Komenský-Esperanto-societo,nuna honora prezidanto,72 jara k-do.Frant.Seďláček kun granda flago de la ĉeĥosl. respubliko.Ambaŭflanke de li 9 kaj 10 jara knabinoj,tenantaj en siaj manoj po unu Esperanto-standarton. La muzikkapelon gvidis kapelestro k-do.profesoro J.Laštůvka,kiu mem verkis ĉiujn voĉojn por la kapelo al la Esperanto-himno,ludata dum la solena inaŭguro de la monumento.

Post la flagoj marŝis anoj de la Esp.-societo-Komenský,reprezentantoj de multaj Esp.-societoj el nia respubliko,eminentuloj,reprezentantoj de la Nacia komitato de urbo Ostrava kaj ceteraj civitanoj.Nur la procesion partoprenis ĉirkaŭ 300 homoj.Atinginte la Rotter-parkon,malfermis k-do.František Lička pres.de la Esp.-societo de la urba kleriga klubo la solenon.Li bonvenigis la reprezentantojn de la diversaj societoj kaj organizoj.En la nomo de la urbestro,k-do.Kotas parolis k-doj.Mach kaj Dluhoš. La lasta fine de sia parolado malvualis la monumenton,kiu estis kovrita per granda ŝtata flago.20 muzikistoj ekludis la ĉeĥoslovakan,la esperantan kaj sovetian himnon.Po-

gne k-do Dluhoš transdonis la porton al Augustin Petru, prezidanto de la distrikta konsilantaro por ke tiu la monumenton gardu kaj prenu sub sia ŝirmo. K-do Chrápavý deklamis poemon pri J.A.Komenský en ĉeĥa lingvo kaj k-do.Vl.Slany, regiona peranto de E.A. ĈSR parolis esperantlingve pri J.A. Komenský „la instruisto de la ĉeĥa nacio", kiu jam en la nesepoko priparolis la necesecon de facila internacia lingvo en sia verko"Brána jazyků" -/Lingva ponto/kaj finis sian paroladon kun la konstato; ke la tiama sonĝo de nia fama verkisto J.A.Komenský efektiviĝis pere de dro.L.L.Zamenhof antaŭ 60 jaroj.

Pro tio ankaŭ brilas sur la pinto de la monumento granda Esperantostelo kaj sur la monumento troviĝas enskribo ĉeĥlingva:"Al memoro por J.A.Komenský, la prapatro de ĉeĥaj pioniroj por internacia helplingvo. Via Lucis 1641. XIX.14, kaj esperantlingva:"Efektiviĝis dro ESPERANTO,26.VII.1887.-Per Esperanto por la mondpaco" Ankoraŭ parolis direktoro de la klera konsilantaro de duagrada lernejo en Ostrava, k-do.Ulman kaj per la salutparoloj de reprezentantoj el diversregionaj Esperanto-societoj kaj organizoj neesperantistaj la inaŭgura soleno finiĝis. Pro la abundeco da reprezentantoj tute ne eblas aparte ĉiun mencii. Ni nur povas konstati, ke la tuta publiko vivo estis ĉi tie reprezentita. En la kadro de tiu soleno okazis ankaŭ esperanta ekspozicio en kiu oni prezentis per Esperanto akiritan materialon el ĉiuj landoj, ĉefe el Ĉinio kaj Japanio. Dum tri tagoj ĝin rigardis pli ol 400 homoj. Posttagmeze okazis regiona kunveno, kiun partoprenis en vigla diskuto 100 esperantistaj gek-doj.

Fine necesas noti, ke la Esperanto-monumento troviĝas en urba parko, kies nomo: Milan Rotter-parko, estas nomo de brava kontraŭfaŝista batalanto, studento k-do.Milan Rotter, kiun la germanaj SS-faŝistoj mortekzekutis nur kelkajn tagojn antaŭ la alveno de la liberiga sovetia armeo. La monumento de Komenský nun fariĝis viva propagandilo de nia ideo en la manoj de niaj gek-doj el Ostrava -Zábřeh kaj trafa armilo kontraŭ la malamikoj de internacia lingvo.

František Lička, Zábřeh

POR PACAJ ESPERANTO-GLUMARKOJ

diversspecaj, belkoloraj kun nacilingva teksto, estas riceveblaj ĉe EACSR Malá Štěpánská 7, PRAHA Ĉeĥoslovakio. Mendu tuj kaj uzu por la propagando!

## KION ILI RAKONTAS ?

La multnombra partopreno de eksterlandaj delegitoj ĉe niaj majfestoj kaj datrevenoj/liberigo de la respubliko/en majo prezentas unu gravan kaj necesan demandon. La eksterlandaj gastoj deziras esti bone kaj guste informataj. Ili demandas pri niaj ĉefaj problemoj, ili interesas pri la progreso de nia socialista konstruado kaj demandas pri tio por povi pliposte rerakonti en ilia patrio. Multe dependas de tiuj, kiuj respondecas pri tio, kiajn respondojn ili ricevas kaj kiom precizaj tiuj estas. Elĉerpaj klarigoj ĉehlingvaj ofte bagateligas aŭ estas neprecize reproduktataj tielmaniere, ke eĉ neinformitulo tuj rimarkas, ke la interpretisto aŭ ne kapablas, aŭ ne penas. Komparu foje la flamajn paroladojn de eksterlandaj delegitoj kun la malvarma tradukado de interpretistoj! Certe ne ĉiuj interpretistoj same agas. Ni ankaŭ posedas tiajn, kiuj bone tradukas, kaj ties laboro signifas grandan politikan servon. Inter tiujn nekomprenebla ne eblas vicigi la interpretiston de la uzina klubo „TATRASVIT", kiu kompletigis siajn sciojn ĝis en la porpaca kunveno, kaj poste supozis ke li tradukas.- Finfine okazis, ke la edzino de membro de Tutmonda Packonsilantaro, s-ino Laffitte mem korektis kelkajn terminojn, kompletiginte la tradukon kaj ankoraŭ antaŭ la fino de la parolado ŝi petis inviti alian interpretiston. Similaj miskompreno[illegible] okazis ankaŭ dum paca pluraj pa[illegible]no en Huko. La partoprenint[illegible] de la tutmonda packonsilant[illegible] intervenis, vidante, ke la [illegible] eĉ kun tiom konata termino, kiel [illegible]tas "Stockholma resolucio" embaras[illegible]as, kaj kun trankvileco el ĝi faris "dokumento"n. Fine estas konata la kazo, kiam interpretisto kun dia trankvileco rakontis al britaj gastoj, ke nia"Revolucia Sindikata Movado"havas saman strukturon kiel la sindikatoj en Anglio.

Tiuj ĉi mankoj, eĉ se ili ŝajnas foje bagatelaj, jus havas profundan konsekvencon, ĉar iliin eblas tre malofte ekkapti kaj korekti. Pro tio mi opinias necesa, dediĉi pli da atento al la gvidantoj kaj interpretistoj por eksterlandaj gastoj. Necesas ne nur kontroli ilian lingvan kapablecon, sed ankaŭ entute ilian akiritan spertecon kaj perspektivon pri la problemoj kun kiuj ili nep[illegible]

devas renkonti dum la plenumo de tiom grava funkcio.

Václav Jelínek

Tradukinte či artikolon el sindikata gazeto"Svět Práce"/Mondo de laboro/n-o.19-1952,mi kredas,ke ni batalantoj por la paco k Esperanto trovis en gi trafan argumenton kontraŭ niaj malamikoj,kiuj rifuzas akcepti nian bonan armilon,la internacian lingvon forigonta čiujn, tiajn miskomprenojn,kaŭzitajn pro la lingva diverseco.Certe multaj laboristoj povus farigi fidindaj tradukistoj,lerninte Esperanton anstataŭ kelkdekoj da naciaj lingvoj,en kiuj ili finfine ne trovas la konvenajn esprimojn.

R. Burda

RASISMO EN MAROKO

En tiu lando la Musulmanoj reprezentas 95 % de la logantaro.Nure 7 % el ili kontaktis kun lernejoj 1 miliono kaj duono da infanoj ne ricevas instruon kaj vagas en la stratoj kaj kamparoj.Eŭropdevena infano kostas al la štato 35.000 fr.jare,musulmana infano nur 16 mil frankojn.Rilate medicinon la lando posedas 1 kuraciston por45 mil logantoj,entute 200 kuracistoj koncentritaj en la urboj,sed ....14.000 policistojn.Franca jugisto diris:"la plejkompleta neatento pri la individua libero karakterizas la nunan regimon; la Marokano estas arbitre enkarcerigebla".

La logejo de la Eŭropano estas unu el la plej luksaj en la mondo dum centmiloj da Musulmanoj vivačas en tielnomataj"bidonurboj", konstruitaj el tabulačoj kaj konservoskatoloj.Por la jaro 1951 neniu kredito en la bugeto de la štato estas antaŭvidita por la logeja problemo.

La terkulturado koncernas 75 % de la popolo kaj oni konstatas,ke la Musulmanoj estas sisteme senposedigitaj.En 1938 ili havis 4,645000 hektarojn,en 1950 nur 3,950.000.

La jurnalisto Jean Rous informigis če la marokaj salajrulojde čiuj korporacioj/fakoj/kaj konsultis iliajn pagatestilojn.La meza salajro estas 7.500 fr.monate por Musulmano eč por laboristo kiu havas jam 20 jarojn da labortempo: sed por la sama eŭropdevena laboristo la salajro estas 23.000 fr. La fakto,esti eŭropano,estas referenco por esti konsiderata kiel specialisto.Kie restas la sindikata moto"Por sama laboro sama salajro"?Ni aldonu,ke en la urboj la prezoj estas proksimume similaj al tiuj de Francio.

En la kamparo la terkultura laboristo,kiu estas malliberigata okaze de plej malgrava protesto,gajnas 100 fr. tage,virino 70 fr.infano 20-30 fr.La komprenemaj koloniistoj,kiuj aldonas al tiu mizera salajro kafon kaj lakton,konfesas,ke ili estas malbone taksataj de siaj kolegoj.

Tiuj kelkaj ciferoj kaj politiko montras,ke ne utilas iri malproksimen ekzemple en Sudafrikon,por trovi tipan kolonian landon,kie rasismo regas majstre,kun la apogo de sinsekvaj franciaj registaroj,kiuj sin pretendas progresemaj,nerasistaj kaj demokrataj.

El bulteno de"SAT-amikaro"

SENLABORECO

EN IAM PLEJRIČA NEDERLANDO

Antaŭ nelonge la presidanto de la Nederlanda Sindikata Konfederacio,Osterhuis donis superrigardon pri la senlaboreco en Nederlando.Interalie li diras: En 1949 estis la plej malalta nombro da senlaboruloj 40.000 kaj la plej alta 84.000.La 31.de januaro estis 165.824 kaj la 29.de februaro en 1952 jam166.016 da senlaboruloj.Osterhuis diras,la senlaboreco treege premas la laboristojn,gi memorigas la krizajn jarojn de 1930-39.Osterhuis difinas,ke la produktado kaj la porproduktada aktiveco mallevigis,kaj ke la moralaj sekvoj estas same malbonaj La politikaj rezultoj de tio montras sin per plifortigo de komunista aktiveco.

Kiam la dekstremaj sindikatestroj sin turnis al la registaro petante helpon kontraŭ la komunista pliaktivigo,tiu donis jenan perspektivon: En 1952 estos elspezotaj 500 milionoj da guldenoj pli por defendo-mendoj ol en 1951,el kiuj 400 milionoj favore al la nederlanda industrio.Kontraŭ tio la sindikatestroj opinias,ke la registaro ne sufiče stimulas la plenumadon de la milita defendo-programo. Osterhuis denove konstatis,ke la defendo de Okcidenteŭropo signifas batalon je kvar frontoj,nome je la milita,la ekonomia,la sociala kaj la morala fronto.

Jen rimedo,kiel la kapitalistoj solvas siajn problemojn per la sindikatoj.

-N I A M O V A D O-

HRADEC KRÁLOVÉ,Hodiaŭ ni povas kun ĝojo konstati,ke nia ekspozicio renkontis kun sukceso.Dum tuta semajno grandaj afiŝoj en la stacidoma halo kaj en komercejaj fenestroj invitis la publikon al tiu ekspozicio.La stacidomestro per la fervoja radio dissaŭdigis ĉiutage inviton al la vojagantoj por viziti la Esperanto-ekspozicion.Dank al tiu propagando, gin rigardis 2.500 homoj el 440 lokoj de nia lando.Bonaj samideanoj ĉiutage dejoris kaj klarigis al la vizitantoj la signifon de la ekspoziciita materialo.Samtempe okazis distrikta laborkonferenco,kiun partoprenis delegitoj kaj gastoj el diversaj lokoj de nia lando.La tuta procedo estis tre aktiva kaj oni pritraktis ĉiujn gravajn problemojn de nia movado.La kasistino,k-dino Hromasová konstatis,ke 160 klubanoj por ĉi jaro jam pagis sian kotizon, sed 80 ankoraŭ ne plenumis sian devon. Ni kredas,ke ankaŭ tiuj baldaŭ pagos la kotizon kaj restos fidelaj al nia alta ideo.

MLADÁ BOLESLAV, La uzina klubo-AZNP-ROH,laŭ raporto en cirkulero de Hradec Králové tre vigle laboras.Laŭ anoncita plano gis la jarfino,oni arangos ĉiumonate diversajn prelegojn lumbildparoladojn,kursojn ktp. Por la mon.oktobro estas preparota ekspozicio de peresperanta materialo pri "Tutmonda Klasbatalo" kompletigota per Esperanto-korespondajoj.

PLZEŇ, La 21.de majo okazis membrakunveno kun lumbildparolado pri Ĉinio kaj la bakteria milito en Koreio.La sama parolado ripetigis por la tajlorkomunumo en Plzen la 28/5.kaj por la dungitoj en la urbdomo la 22/5.post la laborfino.Entute partoprenis 235 homoj.Dum la membra kunveno raportis k-do.Josef Pech pri la inaŭgura festo de la J.A.Komenský-monumento en urbo Ostrava,kiun li partoprenis kiel delegito.Dum la monato majo la infanoj de nia rondeto ekspedis 54 leterojn al eksterlandaj infanoj kaj la aktivaj membroj pli ol 100.Proponita mal fermo de kurso fiaskis,ĉar la organizinto,k-do.Reiser ne sufiĉe penis por varbi adeptojn.Estis senditaj salutleteroj al la brita packonferenco de la uzina konsilantaro de la plzenaj bierfarejoj kaj de la Esperanto-rondeto ĉe la urba kleriga klubo.Pri 5 ekspoziciaj kestoj en la urbo zorgas k-doj.Lukeš,Skala,Burda kaj Proskovec.Ekspozicio pri "Tutmonda Klasbatalo" okazis de la 1-8 junio en kultura domo de 4 komunistaj organizoj kun inaŭgura prelego pri"Ĉinio kaj la bakteria milito en Koreio.Prelegis k-do.Burda.Okaze de la infantago estis instalitaj eksterlandaj infanleteroj,desegnoj fotoj kaj aliaj esperantajoj,ricevitaj ,en la granda ekspozicia fenestro de nia sekretariejo,kiun kun intereso rigardis miloj da ĉirkaŭpasantoj.

OSTRAVA-ZÁBŘEH,La 30.de marto okazis generala kunveno de Esp. rondeto "Komenský"ĉe la urba kultura klubo.Estis elektita 16 membra nova komitato,kiun presidos k-do.Lička Fr.La rondeto tre vigle laboras por nia afero. Legu detale sur pago 2.

DĚČÍN,la rondeto arangis la 3an de junio prelegon pri Ĉinio kaj la bakteria milito en Koreio por lokaj lernejinfanoj.La sama prelego ripetigis la 6.de junio en la kultura domo por fervojistoj. Prelegis k-do.Václav Růžička.

BRNO, la 7.de junio okazis en la spegula salono de hotelo Pasage granda teatra vespero,kiun prezentis la teatra kolektivo„Verda Masko" sub la gvido de konata esp-ista operkantistino V.Borská. La vespero konsistis el vere interesa programo esp.-lingva. La partoprenintoj plene kontentigis. La sekv.tagon matena je la 8 1/2 okazis regiona kunveno de la esp. rondeto-"Komenský" en Brno.

ROŽNOV n/Radh.,de la 12 -26 julio okazos ankaŭ nunjare someraj esp. kursoj dum kiuj oni bone povas gui sian vagancon kaj samtempe perfektivigi en la lingvoscio. En Rožnov tiujare denove rendevuos multaj esperantistoj kaj komencantoj el ĉiuj lokoj de nia respubliko.Detalajn informojn petu ĉe EAĈSR,PRAHA,Malá Štěpánská 7.

H E L P U

al niaj slovakaj gekamaradoj ! La junulara Esperanto-rondeto en S v i t, Slovakio,gis nun posedas nek bibliotekon,nek alian Esp. literaturon.Kiu el la legantoj -

povus dediĉi ian libron,broŝ.aŭ gaz. bonvolu sendi al k-do.Ŝtefan H o r á k Penzion III,B.16, S V I T , Slovakio. Al ĉeĥosl.gek-doj.li eblas pagi ĉion. Al eksterlando pagi ne eblas,oni povas nur sendi kiel donacon.

K O R E S P O N D I

D E Z I R A S :

La Deventera Komunumo Junulara organizos la 6.de Julio leter-matenon. Bonvolu sendi grandamaso let.,il.p.k.,gaz.,broŝ.ktp.pri Ĉeĥoslovakio.Se Se eblos,ni arangos ekspozicion per tiu materialo.Sendu ĉion al k-do.Ab Kraaijenzank,Tjoenerstraat 62.Deventer,Nederlando.

K-do.Hirosi Ooutiyama ĉe Hikari sobo N-o.10.Wakamiya-mati 4. G I H U,Japanio,dez.interŝ.infandesegnojn kaj pentrajojn kun ĉiuj landoj.

K-do.Jasques Donard,5 rue de la Prevajanco,Villeurbanne,Francio,dezir. interŝangi infandesegnojn.

Maivor L i n c l é,12jara knabino/, Gläcjev 58.Häselby,Stockholm,Svedio dez.interŝ.il.p.k.kun ĉiuj landoj.

K-do.Arnor Hannibalsson,Skolagötu 10 Isafjordo,Islando,dez.interŝangi infandesegnojn kaj il.p.k.

Knabino,Gotinski Ryczard.Szk.Postawowa,Mszczonov k W-wy. Polio,per il. p.k.kaj leteroj.

Hungara packomitato"Vas Magyei Béke Bizottzág"Hollán,Erno ut.1.,Szombathely,Hungario.interŝangas nacilingvajn bildafiŝojn,precipe porpacajn plakatojn.

Kansai ligo de Esperanto-grupoj,ĉe Kita Satori,Sieizzyutaku 72,Kitaogimati,Kita-ku,O s a k a,Japanio, arangos ĉi somere grandan ekspozicion de infandesegnoj kaj fotoj pri la diverslanda vivo de infanoj por propagandi Esperanton kaj interamikigon infanan.Ĉiu sendaĵo estas rekompencota per samvalora japana.

K-do.Miyamoto Masao,Nobatake 1011, Toyanaka,Japanio,dez.por lokaj pacamikoj porpacajn afiŝojn interŝ.

K-dino. K u r e k Anna,Ul.Krotka 33 Zawiercie,Polio, interŝ.p.m.

K-do.K a p r á l Václav,18j.studen -to,Nerudova ul.10,PLZEŇ,Ĉeĥoslov. interŝ.il.p.k.kak p.m. Certe resp.

K-do.G o n z e l m a n n Robert /mezlernejano/Untere Bachstr. 4 Taifingen Kreis Balingen,Würtem -ber,Germanio,komencanto,interŝ. p.m.,il.p.k. kaj gazetojn.

S-ano.Artur da Cruz Simoes. R.Francisco Marques Beato 72 r/c E-Moscavide - Lisabono,Portugal. 30jara radioteknikisto kun fraŭlino.

K-do. K r o u l í k Zdenék,sprá. "Černá Bouda" Jánské Lázné,Ĉeĥosl Pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj.

K-do. S r á m Josef,stud.,Purkynova č.496,NÁCHOD,Ĉeĥoslovakio, precipe kun ĉinaj gek-doj,p.m., p.k.il.,gaz.kaj libroj.

K-do. B o s á k Miloš,Benešova č.565,HRONOV,Ĉeĥoslovakio, ĉefe kun ĉinaj gek-doj.interŝ.p.m., il.p.k.,gaz.kaj librojn.

B E L A P O Ŝ T K A R T O

montranta la Esperanto-monumenton de J.A.Komenský en Ostrava - Zábřeh,estas mendebla ĉe k-do.: L i ĉ k a Francisko,Březí 12, Ostrava-Zábřeh,Ĉeĥoslovakio. La poŝtkarto estas trafa propagandilo por en-kaj eksterlando.Necesas,ke ĝi estu dissendota precipe al ĉiuj popoldem.landoj.

P E T O al A B O N A N T O J

En la rapideco de ekspedado de „ EL POPOLA ĈINIO" okazis,ke ni sendis al kelkdekoj da gek-doj.dufoje la febr.-martan n-on.Ĉu me tiuj,kiuj ĝin devus ricevi,ĝin ne ricevis,ĉar al ni poste tiuj n-oj.mankis.Ni do gentile petas,bonvolu la duoble ricevitajn n-ojn.al ni resendi.La k-doj kiuj tiun n-on.ne ricevis,bonvolu nin informi,por ke ni ĝin poste povu al ili ekspedi.

A T E N T I G O

Ĉiun korespondaĵon sendu rekte al la redakcio: K-do.Rud.Burda,Palackého nám.č.6,P l z e n,Ĉeĥoslov. Se vi sendas laŭ nia ŝtampilo,al Osvětová Beseda en Plzen,ni ordinare ricevas kun granda malfruigo

Eldonas : Osvětová Beseda - Kroužek Esperantistů,P L Z E Ň,Solní ul.17. Redaktas: K-do.Rudolf Burda,Palackého nám.6. Plzen.
P L Z E Ň - Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O